

GAZETO ESPERANTISTA ELIRANTA LA 15^{ma} DE ĈIU MONATO.

AD. CRESPIN

LA BELGA SONORILO

JOURNAL ESPERANTISTE BELGE
MENSUEL.BELGISCH ESPERANTISCH
MAANDSCHRIFT.

Oficiala Organo de la « Belga Ligo Esperantista » kaj de la Belgaj Ligaj Grupoj.

Organo officiel de la « Ligue Espérantiste Belge »
et des Groupes Belges affiliés.

Officieel orgaan van den « Belgischen Esperantischen
Bond » en der Belgische aangesloten Groepen.

Komandanto LEMAIRE, aganta prezidanto de la *Belga Ligo Esperantista*,
ricevis la jenan gravan leteron :

LABORATORIO PRIVATA
D'ERNEST SOLVAY.

Bruselo, strato des Champs-Élysées,
la 22^a de Novembro 1906.

KARA SINJORO LEMAIRE,

Sinjoro Solvay tre deziras helpi vian klopodon grandaniman kaj sagacan
por propagandi la lingvon « Esperanto ».

Li rogas de vi sian enskribon sur via nomaro, por jara pago da mil frankoj,
por la Belga Ligo Esperantista.

Sinjoro Solvay sendas al vi sian plej bonan komplimenton.

Tu' sincere,
(*subskribo*) CHARLES LEFÉBURE,
Inĝeniero.

Le Commandant LEMAIRE, président effectif de la *Ligue Espé-
rantiste Belge*, a reçu l'importante lettre suivante :

LABORATOIRE PRIVÉ Bruxelles, 43, r. des Champs-Élysées.
D'ERNEST SOLVAY. 22 Novembre 1906.

CHER MONSIEUR LEMAIRE,

Monsieur Solvay est très désireux de venir en aide aux efforts
généreux et clairvoyants que vous faites pour propager le lan-
gage Espérantiste.

Il vous prie de l'inscrire pour un subsidie annuel de mille
francs en faveur de la Ligue Espérantiste Belge.

Monsieur Solvay vous envoie ses meilleurs compliments.

Bien sincèrement,
(signé) CHARLES LEFÉBURE
Inĝenieur.

Commandant Lemaire, werkelijk voorzitter van den Bel-
gischen Esperantischen Bond, heeft den volgende belangrijke
brief ontvangen :

BIJZONDER LABORATORIUM Brussel, 43, Elyseesche veldenstr.
VAN ERNEST SOLVAY. 22 November 1906.

Waarde heer Lemaire,

De heer Solvay verlangt ten zeerste ter hulp te komen aan
uwe edelmoedige en schranderere pogingen om het Esperanto te
verspreiden.

Hij verzoekt u hem voor een jaarlijksch hulpgeld van duizend
frank in te schrijven ten voordeele van den Belgischen Esperan-
tischen Bond.

De heer Solvay stuurt u zijne beste groetenissen.

Gansch rechtzinnig,
(geteekend) CHARLES LEFÉBURE
Ingenieur.

Por la belga Esperantistaro.

Niaj samideanoj ĵus legis, sur la unua paĝo de ĉi tiu numero, la mirindan aprobon al nia propagando donatan de homo pri kiu la plej ĝusta laŭdo por fari estas vere simpla: « Homo imitinda! »

Kaj en tiu vorto « Homo » ni metas la ecojn ne nur de la privata persono, sed ankaŭ de l' publika homo, de l' regnanto, de l' pensulo.

Ernest Solvay (Ernesto Solve) estas, eble, la Belgo kiu povas, kiel eble plej juste, rediri, post Terence: « *Homo sum, et humani nihil a me alienum puto* ». Mi estas homo, kaj ĉio kio estas homa, min interesas.

Jam je la unuaj tagoj de nia propagando, je la komenco de la 1898^a, Sinjoro Ernest Solvay estis unua por apogi, mondonante, la klopodojn de leŭtenanto Lemaire.

Hodiaŭ, oferante al la Belga Ligo Esperantista tiel belan ĉiujaran monsumon, Sinjoro Solvay montras ke li ŝatas kaj estimas niajn progresojn; la aprobo de tiu « *self made man* » (homo de si mem farita), plenigos per ĝojo la koron de l'Esperantistoj.

Niaj amikoj sciigos ankaŭ, kun plezuro, ke Sinjoro Albert Lecointe, membro de l' honora Komitato de la Ligo, oferis al ni cent frankojn; ankaŭ ke Sinjoro Ernest Melot enskribigis sin kiel « protektanta membro », kaj pagis la sumon da 200 frankoj kiu karakterizas tiun kategorion da membroj.

Por la jaro 1905^a-1906^a, Belga Sonorilo ricevis helpmonon da 2000 frankoj, oferitan de sia kreinto, Komandanto Lemaire.

Dank' al tiu helpmono, malaperis defcito da 500 frankoj pri la pasintaj jaroj, ankaŭ defcito da 500 frankoj pri la 1905^a-1906^a jaro; plie oni povis pagi la kompensan salajron de l'administranta sekretario, t. e. trian sumon da 500 frankoj.

En la kaso de Belga Sonorilo restas nun kvin cent frankoj.

Komandanto Lemaire decidis ne atendi ke Belga Sonorilo sufiĉas al si mem por pligrandigi ĝian influon, ĝian efikon; li oferos la elspezojn por aperigi, ĉiuduonmonate, la organon de l' belgaj esperantistoj; komence de Januaro 1897^a, Belga Sonorilo aperos dufoje ĉiunonate, sen pligrandigo de l' prezo por la malnovaj abonantoj de l' nuna jaro.

Kompreneble, la estonta abonprezo estos iom pligrandigata.

Ni devas deziregi ke Belga Sonorilo aperu ĉiudimanĉe.

Tiel ni faros tuj kiam la nombro de l'abonantaj estos sufiĉe granda.

Estas eble interesa atentigi pri tio ke Belga Sonorilo havas administracion tute memstaran, sen ia dependo je la administracio de la Ligo.

La Komitato de la Belga Ligo Esperantista kunvenos ĉe sia prezidanto, Kom^o Lemaire, strato Ten-Bosch, n^o 53, en Bruselo, je la 10^a matene de l' dimanĉo 30^a de Decembro.

Aux Espérantistes belges.

Nos partisans ont lu à la page précédente l'éclatante adhésion à notre mouvement de propagande d'un des hommes dont le meilleur éloge à faire est bien simple: « Homme modèle ».

Et dans le mot « Homme » nous mettons l'homme privé comme l'homme public, le citoyen, le penseur.

Ernest Solvay est peut-être le Belge qui pourrait le mieux redire après Térence: « *Homo sum, et humani nihil a me alienum puto* ». Je suis homme, et rien de ce qui touche aux hommes ne me laisse indifférent.

Dès les premiers jours de notre propagande, au début de 1898, Monsieur Ernest Solvay fut le premier à soutenir pécuniairement les efforts du lieutenant Lemaire.

En attribuant à la Ligue Espérantiste Belge une aussi belle souscription annuelle, Monsieur Solvay montre qu'il est content de nos progrès; l'approbation de ce « *self made man* » remplira de joie le cœur des Espérantistes.

Nos amis apprendront aussi avec plaisir que Monsieur Albert Lecointe, membre d'honneur du Comité de la Ligue, nous a remis cent francs, et que Monsieur Ernest Melot s'est inscrit comme membre protecteur et a payé la somme de 200 francs qui caractérise cette catégorie de membres.

La Belga Sonorilo a reçu, pour l'année 1905-1906, un subside de deux mille francs de son créateur, le Commandant Lemaire.

Ce subside a permis de couvrir un déficit de 500 francs qui restait des années précédentes, un déficit de 500 francs pour l'année 1905-1906, et enfin les émoluments du secrétaire administratif, soit une troisième somme de cinq cents francs.

Il reste en caisse cinq cents francs.

Le Commandant Lemaire a décidé de ne pas attendre que la Belga Sonorilo se suffise à elle-même pour en accentuer l'action; il couvrira donc les frais de la publication bi-mensuelle de l'organe des Espérantistes de Belgique; dès janvier 1907, la Belga Sonorilo paraîtra deux fois par mois, sans augmentation de prix pour les anciens abonnés pour l'année courante.

Il va de soi que l'abonnement sera légèrement majoré par la suite.

Le desideratum à atteindre est que la Belga Sonorilo paraisse chaque dimanche.

Cela se fera quand le nombre d'abonnés le permettra.

Il est peut-être bon de faire remarquer que la Belga Sonorilo a une administration indépendante de celle de la Ligue.

Le Comité de la Ligue Espérantiste Belge se réunira chez son président, le Com^t Lemaire, rue Ten-Bosch, 53, à Bruxelles, le dimanche 30 décembre à 10 heures du matin.

KONKURSO DE BELECO.

(Epizodo eltirita el « *Au pays des Manchots*, » de G. Lecointe sub-komandanto de la *Belgica* dum la Belga Esplorado ĉe la suda poluso).

La 7^{ma} de Aprilo 1898, kiam ni klopodis por eltrovi gravajn dokumentojn, iu el ni ekvidis en iu tirkesto dekon da ilustritaj albumoj — donaco de amiko el Antverpeno — enhavantaj la portretojn de la plej famaj belulinoj de la mondo.

Tuj kaptis nin la deziro organizi, per tiuj portretoj, « Konkurson de Beleco ».

La propono estis akceptata, kaj la konkurso fikŝata je la sekvanta dimanĉo vespere, la 10^{ma} de Aprilo.

Car estis necese pligravigi la rolon kiun ĉiu devos ludi, ni decidis elekti reĝon kaj reĝan princon kiel estrojn de la Honora Komitato; ankaŭ ministraron kiel membrojn de la laboranta Komitato. Sekve, Arkowski estis proklamata reĝo sub la nomo Artocho I^a, dum Roald Amundsen fariĝas lia moŝto la reĝa princo.

Mi estis nomata Ministro de la Belulinoj, kaj mi elektas Racovitza'on kiel membron de la Kabineto; de Gerlache, Cook, Melaerts, estas nur elektantoj.

Ni estis apenaŭ komencintaj nian laboron kiam grandega malpaco okazis en la Kabineto: de Gerlache kaj mi estis nesingardeme dirintaj ke Klara W..., la tro fama eksprincino, estas multe pli bela ol ĉiuj aliaj belulinoj!

Racovitza, freneze kolerega pro tio, certigas ke la glora danc-artistino Kleo de M... certe pli ol Klara meritas ĉiujn voĉojn.

Kiel serioza ministro, mi elektis elektsistemon kiu plej multe favoras mian propran sukceson. Same mi starigis la regularon de la konkurso.

Jen estas la modelo de Pafisoj kiuj estis afiŝataj ĉie:

Granda Konkurso de Beleco

organizata ĉe la polusaj regionoj, sub la tre alta protekto de Liaj Moŝtoj Artocho I^a, Reĝo de la Glaciejoj, kaj Roald, Reĝa Princo.

Regularo.

ART. I. — La portretoj — kies nombro estas 464 — de la plej perfektaj belulinoj estas en la arĥivoj de la ministrejo. Ili montras numerojn anstataŭantajn la personajn nomojn.

ART. II. — La decido de la juĝantaro bezonos plenumi la sekvantajn kondiĉojn:

Oni voĉdonos dufoje por ĉiu premio: la belulinoj elektitaj unuavice havos preferon; tri voĉoj estas postulataj por ricevi la unuan premion, du por la duan, unu por la trian. La rebaloto por la definitiva elekto okazos por la ses belulinoj kiuj estos ricevintaj la plej multajn voĉojn. La nombro ses estos pligrandigebla.

N. B. Reklamoj kaj delogoj estas permesataj.

Disdono de l' premio.

Tuj kiam *La Belgica* alvenos al haveno, la Ministro de la belulinoj sendigos la premiojn al la virinoj kiuj estos proklamitaj la plej perfektaj belulinoj.

La Konkurso estas triparta:

I^e — Konkurso pri la ĝenerala aspekto;

II^e — Konkurso pri la detala aspekto, ekzemple la plej belaj okuloj, buŝo, manoj, kaj cetere.

III^e — Konkurso pri la feliĉeco, tio estas: la elektantoj devos citi la belulinojn kiujn ili plej ŝatas.

La Estro de la Kabineto:

RACOVITZA.

La Ministro de la Belulinoj:

G. LECOINTE.

Kiam komencis la voĉdono, mi naive imagis ke mi estas ministro sufiĉe potenca por ke mia voĉo donu la venkon al Sinjorino Klara W..., la numero 209^a de la nomaro, kaj por ke ŝi venku tre facile Fraŭlinon Kleo de M..., la numeron 64^{an}.

Sed, kiel mi diris antaŭe, tuj de la morgaŭa tago de nia eklaboro, mia kabinetestro fariĝis mia plej grava kontraŭulo. Mi provis timigi lin per minacoj, sed vane; Racovitza daŭrigis siajn malindajn politikajn intrigojn, forrabinte tiamaniere la voĉon de Amundsen kaj Danco, dum de Gerlache kaj mi mem, per multegaj promesoj, nur sukcesis alvarbi Doktoron Cook. Melaerts kaj Arkowski estis ŝanceligitaj volante, kiel ruzaj elektantoj, elekti tiun kiu donos al ili la plej grandan profiton!

Estas rimarkinda kiel rapide homo refariĝas infano! Ĉu ni ne vidas la oficirojn de la Milita Lernejo refari la petolajojn kiuj antaŭe amuzigis ilin kiam ili estis lernantoj en la Politeknika Lernejo? Same okazis ĉe ni: dum la laboraj horoj, la vizaĝoj estis seriozaj, sed tuj kiam okazis la manĝadoj, grandaj afiŝoj ekaperis en la ĉambroj, en la kordoro, en la salono, sur la tablo, ĉie!

Estas nur unu belega virino sur la Tero:

Estas n^o 64^a.

La numero 209^a estas ne virino, sed anĝelo!

ELEKTANTOJ!

Oni trompas vin: nur la n^o 64^a meritas viajn klerajn voĉojn!

Kaj, iam, ni vidis, sur la manĝo-tablo, grandan pastecon sur kiu Racovitza, mokinta la ministron, estis skribinta per ovblanko:

VIVU LA N^o 64!

Fine, la 10^a de Aprilo alvenis.

Post la vespermanĝo, K^o de Gerlache anoncas la oficialan malfermon de la konkurso. De tiu momento, nepriskribebla bruego regas! Ĉiuj parolas samtempe; neniu volas aŭskulti la solenan alparolon kiun mi faras al la konkurantinoj.

Plie, la plej aroganta el ĉiuj estas mia kabinetestro, kiu kuraĝas antaŭdiri la falon de mia ministraro, kaj eĉ ĝojas bruege pro tio!

Samtempe, Artowski estas subaĉetita de Racovitza kiu pagas lin per tri dikaj korkŝtopiloj kiujn li multe bezonas en sia laborejo! Feliĉe! la bravulo Melaerts plifortikigas mian ŝancelantan povon, pro kio mi tuj elektas lin kiel Grandoficiro de l' Oleosardela Ordeno. Cook, dume, estas tute nekonscia, li ne komprenas unu vorton el la paroladoj. Tio, kompreneble, estas por mi tre bona afero: tial, li ne estas subaĉetebila. Plie, ne ŝparante sian penon,

nek siajn pulmojn, li ne ĉesas kriegi: « 209, Klara, unua premio! »

Fine, oni kalkulas la voĉojn.

Venkon! La numero 209^a venkas! subite mi eksaltegas al la muzikkestro en kiun mi enmetas la muzikan rulilon de la « Brabançonne » sed, pro mia rapideco, mi ĝin enlokigas supron-malsupre, kaj la malbelsoneco de l' kanto enmiksiĝas kun la malbonsoneco de la kriegoj de niaj malamikoj kiuj kulpigas nin, dirante ke ni falsigis la nomarojn! Estas freneza bruego!...

Tiam, de Gerlache, dezirante pacigi ĉiujn, malstopigas botelon da ĉampano. Kaj ni trinkas ĝoje kaj amike por la sano de ĉiuj belulinoj de la mondo!

Esperantigis E. LECOINTE.

Tria Kongreso de Esperanto.

de la 12^a ĝis la 17^a de Aŭgusto 1907^a.

Niaj anglaj amikoj ne perdis sian tempon. Apenaŭ fermiĝis la kongreso de Genevo, kaj ni jam havas novaĵojn pri la venonta, okazonta en Anglujo.

En Genevo mem, la Angloj tuj elektis *Provizoran Organizan Komision*, konsistantan el S^{ro} George Cunningham, skota scienculo, Kolonelo John Pollen, irlanda advokato, kaj S^{ro} Bolingbroke Mudie, redaktoro de la antaŭa *The Esperantist*.

Poste, la komitato de la Brita Esperantista Asocio aprobis tiun elekton, kaj la komisio alprenis la titolon: « *La Trio por la Tria* ».

**

La urbo elektita por la 3^a Kongreso estas Cambridge.

Post interkonsiliĝo kun la estroj de l' Universitato kaj de la urbo, estis decidata ke la Kongreso povos uzi senpage la Urbestrejon, kun orgeno, la Gren-Vendejon (la plej vasta ĉambrego en la urbo) kaj ĉiujn komunumajn konstruaĵojn.

La dato elektita por la 3^a Kongreso estas: de la 12^a (lundo) ĝis la 17^a (sabato) de Aŭgusto.

**

La Trio deziras ke, por bone aranĝi la aferon, kaj trovi, por ĉiuj, komfortajn loĝejojn po nealta prezo, oni bonvolu sendi al ĝi poŝtkarton kun jenaj sciigoj:

1. Ĉu vi intencas partopreni la 3^a Kongreson?
2. Se jes, ĉu vi intencas ĉeesti la tutan tempon? Se ne, kiom da tempon?
3. Ĉu vi venos sola, aŭ akompanata? Kun kiom da personoj (diru sekson)?
4. Ĉu vi deziras fariĝi garantianto?

Pro la konata laboremo de niaj anglaj amikoj, oni povas fidi pri granda sukceso. Sed devo estas ke ĉiuj belgaj samideanoj ĉeestu la Kongreson; la vojaĝo ne estas longdaŭra, kaj ĝia kosto ne alta. Antaŭen!

J. COOX

N. B. Garantiantoj estos tiuj kiuj donacos sumon da almenaŭ 250 frankoj.

Por helpi la sukceson de la entrepreno, la Trio garantiis sumon da 7500 frankoj (Rim. de la Red.)

Pri la Esperanta festo en Antverpeno.

13-14 Oktobro 1906.

La antverpenaj esperantistoj havis la honoron kaj la plezuron reteni ankoraŭ en sia urbo la estimatan S^{on} A. Michaux, la tagon post lia rimarkinda kaj aplaudita parolado en la ĉambrego de la Reĝa Ateneo.

La simpatia prezidanto, S^{ro} D^{ro} Van Melckebeke, estis invitinta S^{on} Michaux kaj kelkajn antverpenajn samideanojn por trinki glason da matenvino en sia domo, kaj por fari poste ekskurseton tra la urbo. Inter la ĉeestantoj estis S^o kaj S^{ino} Ansel, ankaŭ el Bulonjo ĉ. M., kiuj, edziĝintaj de du semajnoj, finigis sian edzecan vojaĝon tra Antverpeno.

La ĉefa celo de la promenado estis vizito al la muzeo Plantin. Ĉi tie la bulonjaj gastoj tre admiris la riĉajn kolektojn kaj la multekostajn meblojn kaj ĉiuspecajn artaĵojn de la antikva patricia domo, kie ĉio ilin interesis.

Interparoladante agrable, oni trairis poste la ĉ. fajajn stratojn de la urbo (la vetero, hieraŭ tre pluva, estis fariĝinta tre bela intertempo), kaj je la unua horo, amika festeneto kunigis ĉiujn en la Taverne S^t Jean, apud la centra stacidomo.

Ĉi tie regis la plej kora ĝojo. Kelkaj kunmanĝantoj gajigis la kunvenon per kantoj kaj piano-fortludo; grandan sukceson ricevis la de S^{ro} Fr. Swagers verkita « Trinkkanto », kies rekantajon ĉiuj ĉeestantoj kantis hore. Komprenoble, ne mankis toastoj: S^{ro} Van Melckebeke ree gratulis S^{on} Michaux pri lia belega hieraŭa parolado, per kiu li faris la plej grandan servon al la esperantista movado en Antverpeno; siavice, S^{ro} Michaux certigis ke li ĉiam estas preta por servi la esperantan aferon, kiu ĉiuokaze povas fidi je lia tuta sindono. Li dankis la antverpenajn kamaradojn pri la amika akcepto kiun li ricevis en la Skeldurbo, kaj fine trinkis je la sukceso, je la venko de nia granda idealo.

S^{ro} Makso Horowitz, unu el la plej agemaj membroj de la Antverpena Grupo, kaj fervora fideulo de la « Gasttablo », nun turnis sin al S^{ro} Michaux kaj elparolis tre rimarkindan paroladon, el kiu mi ĉerpas la jenajn, vere altegajn esprimojn:

« Kiam mi aŭdis hieraŭ — li parolis — la spirito — riĉajn klarigaĵojn de mia inda samideano, mi » diris al mi: Ho kiel estas bele, batali pri la sankta » ideo! Estis ĉiam mia profunda deziro, mia unua » revo vidi la homaron, vidi la tutan mondon kun- » ligatan kaj fratiĝantan nur per unu lingvo! Kiel » mi vidis hieraŭ, mia revo estis plenumita, ĉar mia » kara ideo venkis kaj venkos. Nia bela lingvo dis- » volviĝadis kaj disvolviĝados. Nur unu penso, nur » unu celo instigas min. La ĉarmaj vortoj de S^{ro} » Michaux trapenetris mian koron. La hieraŭa » inspireco kaj sentado, kiujn mi hodiaŭ ankoraŭ » sentas, inspiras min tiel, ke mi vokas perforta » voĉo: Multe da dankoj al S^{ro} Michaux! Li vivu! » Li vivu!!! »

S^{ro} Michaux kaj Gesinjoroj Ansel forlasis Antverpenon dum la antaŭvespero, lasantaj inter siaj novaj konatuloj la plej dolĉan, la plej agrablan impreson.

AMATUS.

Komerca Propaganda.

Estimata Sinjoro,

Ni havas la plezuron scigi vin ke ni fondis en Parizo sekcion de la Esperantista Grupo Pariza sub titolo:

Sekcio industria kaj komerca de la Esperantista Grupo Pariza.

Ni estus feliĉaj se vi sciigus komercistaron de via urbo ke komercistoj povas komerci kun pariza komercistaro eĉ ne sciante la lingvon francan, per nia sekcio.

Ni transdonos ĉiun komunikadon esperantan al via eĉ ne Esperantisto el la komercistaro de Parizo kaj ĉirkaŭurbo.

Ĉiuj transdonaĵoj estas senpagaj.

Ni sendos sciigojn pri komerco pariza al ĉiu kiu sin turnos al ni.

Ni esperas ke vi povos doni al ni adreson de simila oficejo en via urbo al kiu povos sin turni la komercistoj ne sciantaj vian propran lingvon.

Ricevu nian profundan saluton,

For la Komitato:

BALLIMAN

21, rue de l'Arbre-Sec, Paris.

El Frankfurt a/M.

11^{an} de julio 1906^a.

« La Progreso » Internacia Komercista Esperanta Societo, sidejo Frankfurt a/M., Neue Mainzerstr. 59, progresadas. Ĉe ĝia fondo de kelkaj semajnoj ĝi havis ĉirkaŭ 100 membrojn, nun ĉirkaŭ 200, inter ili 8 firmojn. Ĝi sukcesis gajni por ĝia celo la « Kaufmännischer Verein » kiu havas 17,000 membrojn kaj kiu publikigis en sia organo: « Kaufmännische Zeitung » laŭvorte la tutan paroladon, kiun S^{ro} Feyerabend faris ĉe la fondo de la societo. Plie, ĝi donis al la juna societo senpage instruojn por esperanta instruo. Ankaŭ urban lernejon la societo obtenis, por instrui en ĝi Esperanton. Devas esti speciale akcentata, ke la « Progreso » tute ne volas konkuri je la Esperantistaj Grupoj — tri estraranoj de la Esperantista Grupo Frankfurt a/M., inter ili la prezidanto S^{ro} Kuchler mem, estas ankaŭ en la estraro de la « Progreso ». En urboj en kiuj jam ekzistas Esperantistaj Grupoj, la « Progreso » rekomendas al siaj membroj uzi la lernkursojn de tiuj, ĉar ĝia ĉefa celo estas provizore: *la propagando de Esperanto nur inter la komercistaro kaj, tiamaniere, ke ĝi multe povu helpi la agadon de la Esperantistaj Grupoj, kiuj hodiaŭ havas la malfacilan taskon de la propagando de Esperanto inter la plej diversaj homaj klasoj kaj profesioj. Kiu estas la homo, kiu plej ofte devas interkomunikiĝi kun la riprezentantoj de la plej diversaj nacioj? la komercisto! Li do unue ekkonos la gravegecon de nia ideo kaj post la praktika konsidero de la moderna komercisto tre rapide malaperos la antaŭjuĝoj, kiujn ofte, tre ofte, ankoraŭ renkontas la ĝenerala propagando de nia afero inter la diversegaj profesioj.*

Antaŭen do, la celo estas klara antaŭ niaj okuloj, ni streĉu ĉiujn fortojn por ĝin atingi!

« Progreso »

La fame konata firmo Stephens, ink-fabrikisto en Londono, sendis al ni la jena leteron, kune kun sekvanta cirkulera letero de D^o Zamenhof.

La firmo Stephens jam de kelka tempo uzas Esperanton por siaj reklamiloj, katalogoj, prezaroj k. c.

Tiu kiu deziras ilin ricevi bezonas nur ilin peti per poŝtkarto esperante skribita al firmo Stephens.

Ĉu ni bezonas aldoni ke la Stephens'a letero estas originale esperanta?

Pro la ĝentileco de la Brita Esperantista Asocio mi povas sendi al vi la enmetitajn inksorbilojn kune kun sciigoj pri miaj diversaj fabrikadoj, kiuj espereble interesos vin.

Miajn inkojn vi kredeble jam fame konas; se vi ankoraŭ ne uzadas ilin, mi uzas tiun ĉi okazon, petante vin bonvole fari provon el ili.

Se vi konas Esperantistojn, kies nomoj ne ekzistas en la Tutmonda Jarlibro, mi plezure sendos similan paketon da cirkuleroj al ĉiu el ili, de kiu mi ricevos esperantan poŝtkarton kun la nomo kaj adreso legeble skribitaj.

Vere via,

HENRY STEPHENS.

Jen estas la cirkulero de D^o Zamenhof, kies sendelspezojn la firmo Stephens prenis sur sin. Estas dezirinda ke ĉiu Esperantisto sendu al D^o Zamenhof la petitajn sciigojn:

CIRKULERA LETERO.

La glorie konata firmo « Stephens' Inks » afable proponis al mi, ke ĝi dissendos al ĉiuj Esperantistoj ian leteron, kiun mi deziras adresi al ili. Farante uzon el la dirita propono, mi petas nun, ke ĉiu Esperantisto volu sendi al mi (sur aparta papereto, sen ia alia alskribo, kaj klare legebla) la sekvantan letereton, kiu helpos al la aranĝo de tute ĝusta komuna adresaro de Esperantistoj.

Kun saluto al ĉiuj Esperantistoj,

L. ZAMENHOF.

Al S^{ro} L. Zamenhof,

str. Dzika N^o 9,

Varsovio. —

Responde al via cirkulera letero, dissendita per la firmo Stephens' Inks, mi sciigas vin, ke mi akceptas leterojn en Esperanto kaj mia nuna adreso estas la sekvanta:

Regno: _____
Lando: _____
Provinco: _____
Urbo: _____
Strato: _____
Domo: _____
Persona nomo: _____
Familia nomo: _____
Profesio aŭ specialeco: _____
Aĝo: _____

Subskribo:

Ĉiuj Esperantistoj estas insiste petataj diskonigi kiel eble plej vaste tiun ĉi leteron. Ni plezure sendos al ĉiu petanto ekzempleron de ĝi.

Inkoj de STEPHENS,

LONDONO.

(Aldersgate Street).

Kiamaniere propagandi

nian lingvon kaj prepari la vojon por ĝia enkonduko.

« **La Problemo estas solvita** ». Tion ĝoje ekkriis D^{ro} Zamenhof, kiam post longa laboro » *salis radio de lumo sur la terurajn grandegulajn vortarojn* » kaj kiam « *li kaptis la ideon por la sufiksoj* ». (Esp. Prozaĵoj p. 241).

Nenio alia povas pruvi la fakton de la solvita problemo pli bone, pli konvinke ol la esperantaj ŝlosiloj.

Mane ekkapteblaj, palpeblaj pruvoj, ili mem parolas silentan lingvon, malnecesigante kaj nutigante ĉiun argumentadon.

Eble ŝajnos iom strange, ke eldonisto kantas la laŭdon de siaj propraj eldonaĵoj; tamen, la ŝlosiloj ne estas mia ideo, sed nur la efektiviĝo de tio, kion D^{ro} Zamenhof diris en sia unua libro de la lingvo Esperanto. (vidu Krest. p. 252).

Ĉu, post eĉ supraja tralegado de la libreto, homo spirite sana povos daŭrigi la komparon de Esperanto kun Volapük?

Ĉu senpartia prijuĝanto ne estos fortege impresata per la konstato, ke 5 gramoj da presitaĵo povas vere enteni la tuton de lingvo artefarita, en tia maniero ke per ĝi, sen « grandegulaj vortaroj », sen longa studado, ĉiu eĉ nemulte instruita homo povas tuj traduki ĉion en Esperanto skribitan?

Ĉu ne devas al li fariĝi tuj evidenta la granda diferenco inter Esperanto kaj ĉiuj aliaj artefaritaj lingvoj, kiuj ĝis nun naskiĝis kaj plej grandparte ankaŭ jam mortis?

Ĉu ne malaperos subite antaŭ la okuloj la vera « crux », kiu sin kontraŭstarigas tute nature al la kredo ke artefarita lingvo ne estas utopia, sed ebla, ellernebla kaj praktikebla?

Jam per sia formo, la ŝlosiloj tuj detruas la ortodokse tenatan konvinkon ke, por lernado de nova lingvo, estas ĉiam kaj nepre ankaŭ necesa la ellernado de nombro da vortoj, samgranda kiel tiu de la patra lingvo.

Malaperos la fantoma teruriganta vizio de la « grandegulaj vortaroj » post travido de la paĝoj 5, 6 kaj 7. Instinkte pensas aŭ demandas neesperantisto al kiu oni donis ŝlosilon: « Sed kie estas la vortaro? »

Ĉu ne, kun D^{ro} Zamenhof, li ankaŭ devas konfesi post ekzameno de la paĝoj supre cititaj: « la problemo esta solvita »?

Li eble riproĉos: « La vortoj al mi ne plaĉas. Ili nur taŭgas por novlatinanoj, ĉar ili estas ĉerpitaj ĉefe el la latina lingvo. »

Mi respondos: « Studadu kaj ekzameni iom pli longe kaj pli zorge ne de via nacia, sed de internacia vidpunkto. Eble vi trovos, ke, kvankam latinaj, ili estas konataj kaj uzataj internacie. Tamen, se vi povas trovi pli bonajn internacie akcepteblajn, ŝanĝu ĉiujn vortojn morgaŭ. Al mi la afero estas tute indiferenta. Mi restados ĉiam Esperantisto. »

La radikoj estas saĝe kaj kun profunda sperto elektitaj, tamen ne ili distingigas kaj sukcesigis

Esperanton super ĉiajn ĝis nun naskiĝintajn sistemojn de lingvoj artefaritaj.

Estas io alia, io kio rajtigis D^{ron} Zamenhof maltime proklami:

« *Se iam montriĝus, ke per ia alia vojo la ideo « de lingvo internacia povas esti realigata pli bone, pli certe kaj pli rapide ol per Esperanto, « tiam la aŭtoro de Esperanto aliĝos al tiu nova « vojo kaj kune kun li, espereble, ankaŭ ĉiuj « Esperantistoj.* »

Kiu el la antaŭuloj de D^{ro} Zamenhof estus kuraĝinta fari publike tian manifeston?

Paroladoj kaj artikoloj en la naciaj gazetoj certe estas tre utilaj kaj necesaj.

Tamen, ĉu ne la esperantista mondo inklinas rigardi ilin, same kiel ni rigardas la malsaĝajn elcerbaĵojn pri Esperanto kiujn oni renkontas ĉiutage en la naciaj ĵurnaloj?

La paroladisto kaj la verkisto de artikolo, kiuj donas justecon al nia lingvo, estas nemalprave suspektataj kiel entuziasmuloj, kaj kion ajn ili diras aŭ skribas, tio estas akceptata nur kun la konata *grajno da salo*.

Ekzistas en la monda multaj skeptikuloj, kiuj deziras mem esplori kaj ekprovi, kaj fari mem sian propran juĝon, kaj kiuj tre malŝatas la altrudon de fremda opinio, precipe se ĝi venas de iu entuziasmiĝinta apostolo de Esperanto.

Por ili la ŝlosiloj taŭgas, ĉar ilia tralego nepre postlasos la senton ke, per Esperanto, la problemo de artingvo vere estas solvita. Ili estas praktikaj pruvoj de tiu ĉi solvo, silentaj konvinkiloj, kiuj rindiros kaj formos la objekton de diskuto inter amikoj kaj en la rondo de la familio.

Se vi deziras propagandi, disvastigi nian lingvon, vi ne povas agi pli bone kaj pli efike ol metante, trudante, ludante per ĉiuj artifikoj, en la manojn de neesperantisto la ŝlosilon.

Kun granda bedaŭro mi ĝis nun ne povis atingi kaj utiligi la kunlaboron de la librovendistoj, kiuj malŝatis la ŝlosilojn pro ilia malalta prezo.

En la vendejoj de la librovendistoj, oni renkontas precipe tiajn personojn kiuj estas vere varbindaj: homojn kiuj legas kaj studas.

La valoro de la helpo de la librovendistoj estas do granda kaj netrotaksebla.

Por atingi ilian bonvolon mi preparis novan propagandilon vendeblan po 10 centimoj. La libreto estas titolata:

La Langue Esperanto

et le moyen de l'apprendre sans leçons, en lisant une petite histoire.

kaj entenas la tutan enhavon de la ŝlosilo, okpaĝan fabelon de Andersen « La malbela anasido » kaj 4 paĝojn da klarigaj notoj.

La kosto de bela kartona skatoletto, enhavanta 100 ekzemplerojn unuope elpreneblajn, kun afiŝoj por la vendeja fenestro estas afranke nur 7 frankoj.

Dum la kongreso, la librovendistoj en Genevo kaj en aliaj franclingvaj urboj vendis dum 4 tagoj 5000 ekz., kaj mi ĵus forsendis novan provizon da 5000 ekz. Svisujon.

En Anglujo estas librovendistoj kiuj mendis po 1000 kaj 1500 ekz. de la angla eldono.

Tio montras ke la malkaregaj 40-paĝaj propagandiloj, presitaj sur pli fortika papero kaj kun pli largaj randoj ol la ŝlosiloj, estas facile vendeblaj, kaj ke la librovendistoj ne plu kontraŭstaras.

Kaj pro kio ili estas nun amikaj?

Ĉar ili vidas sian propran profiton, bone sciante ke la afiŝetoj kaj la aĉeto de la malkara propagandilo nepre ankaŭ altiros al iliaj magazenoj la klientojn por la pli serioza kaj pli multekosta esperanta literaturo.

Esperantistoj aĉetas la libreton, ĉar ĝi entenas praktike ĉiujn vortojn de la universala vortaro.

Neesperantistoj estas altirataj per la afiŝoj kaj riskas 10 centimojn, eble por certigi ke artefarita lingvo estas neebla, kaj por trovi novan materialon por ridindigi Esperanton en la diskutado kun siaj amikoj, kaj por plifortigi sian antaŭjuĝon.

Sed ĉu la rezultato povas esti alia ol bona? Almenaŭ ili estos devigataj paroli pli serioze pri nia lingvo kaj agado ol antaŭe, se ili intencas esti honestaj.

Ŝajnas, ke ankaŭ la tabakvendistoj povas esti utilaj, ĉar franca samideano ĵus skribis al mi:

« Vi povas rekomendi al la samideanoj ke ili faru kiel mi. Mi metis ĉe tabakvendistoj 25 ekzemplerojn, kiujn ili piezure akceptis por havi la malgrandan sumon gajnotan el ĉiu ekzemplero. Estas bona kaj malkara propagando por ĉiuj. »

La elmontrado de la afiŝetoj en la fenestroj de la librovendejoj estas ankaŭ grandega reklamo. Ĝi pruvas al la mondo, ke ni vivas, ke Esperanto marŝas.

Neniu povos disputi, ke la ĉeesto de po unu afiŝo en la fenestro de ĉiu librovendisto en Belgujo estus nekalkuleble valora por la diskonatigo kaj disvastigo de nia lingvo. Tiu ĉi grandega reklamo estas ebla, sed kompreneble mi ne povas ĝin fari sen la helpo de la belgaj samideanoj.

Mi do petas, ke ĉiu belga esperantisto vizitu ĉiujn librovendistojn en sia najbarajo, donante centujon da libretoj kun afiŝo kaj dirante:

« Jen cento da libretoj pri Esperanto, vendeblaj » po 10 centimoj. Metu la afiŝon en vian fenestron, mi » petas. Post disvendo, vi estos enspezinta 10 frankojn, el kiuj vi devas pagi 7 frankojn al mi. Se, » poste, vi deziras novan provizon, skribu al

S^{ro} J. COOX, en Duffel,

» sendante poŝtmandaton da 7 frankoj.

» Mi devas atentigi vin, ke la aĉeto de la malkara » propagandilo nepre kreos por vi klientaron por » la pli karaj gramatikoj kaj vortaroj. »

Por montri mian propran fidon pri la utilo kaj la sukceso de tiu ĉi propagando, mi proponas liveri al ĉiu belga esperantisto aŭ — se li mem ne havas la tempon sin okupi pri tio aŭ se li ne volas mem ion

riski —, al iu ajn librovendisto kies adreso estos donata al mi de iu belga samideano, la unuan centon da libretoj kun afiŝo afranke po 7 frankoj je kondiĉa vendo.

Tio signifas ke la librovendistoj ne estas devigataj ion pagi ol post la vendo, kaj ke mi ĉiam kaj volonte reprenos la ekzemplerojn nevendeblajn, eĉ pagante la afrankan de la resendo.

En tia okazo, oni devas skribi rekte al mi.

E. ЧЕРЕЧ.

45, Christchurch Road,

Streatham, London, S. W.

La Langue ESPERANTO

La Langue
ESPERANTO
et le moyen de l'apprendre sans
leçons en lisant une petite histoire.
POUR DIX CENTIMES.

et le moyen
de l'apprendre
sans leçons
en lisant une
petite histoire.

POUR DIX CENTIMES.

Espereble oni baldaŭ vidos elmontritan en ĉiuj librovendejoj de Belgujo la ĉi supre per kliŝaĵo reprezentitan afiŝeton.

Por ricevi afranke en Belgujo 100 broŝuretojn kun afiŝeto, oni bonvolu sendi poŝtmandaton da 7 frankoj al

J. COOX, en Duffel.

Kelkaj vortoj al nia bonega kunfrato

« The British Esperantist ».

En la novembro n^o de nia kolego (p. 92^a) ni legis sciigon kiel eble plej ĝojigan. Priparolante la diversajn gazetojn ricevitajn, ĝi diras jene, pri novembro n^o de la *Belga Sonorilo*:

Enhavo: « Deklaracio » pri la esenco de Esperantismo. — Nia Revueto. — Internaciaj Don Kihotoj.....

Nu! tio estas la enhavo de nia novembro n^o de la antaŭa jaro!!!

Tio plijunigas nin po unu jaro!
Koran dankon!!

J. C.

Belga Kroniko.

Antverpeno. — Merkredon, 14^{an} de Novembro, nia bonega propagandisto D^o W. Broeckaert donis sian unuan lecionon de Esperanto en « Café des Arts » apud la stacidomo de Berchem.

